— Il grande lessico spagnolo « *España* » ha la traduzione in E. di tutte le parole di nomenclatura (I. E. S. 77).

— « *Signalen* » organo dei ferrov. svedesi, e « *Deutsche Kurtzschrift* » (stenogr. tedesca) pubblicano riassunti in Esp. (I. E. S. 79).

— Il Principe Carlo di Svezia è convinto Esp. La Belga Ligo Esp. avendogli inviato congratulazioni ed auguri, ha ricevuto cordiale e lunga risposta in Esp. (I. E. S. 83).

— L'Univ. Popol. di Udine ha deliberato che un membro del Cons. dirett. del Gr. Esp. faccia parte di diritto del Cons. dirett. della U. P. stessa.

— In un breve lavoro drammatico del giovane scrittore e samid. Arnolfo Santelli da Signa « *Le soste dell'anima* » l'Esp. è ricordato ed usato.

V. — COMMERCIO.

— **Hammond Typewriter Corporation** - Esperanto-Fako, 17 - Second Street, S. Francisco, California U. S. A. - Macchina da scrivere a carattere cambiabile e spazi variabili. Speciali lettere soprassegnate per la più rapida scrittura in Esp...

— *Mezlanda Asekura Komp. Akcia en Nürnberg - Mittelländische Versicherungs - Bank-Aktiengesellschaft - Nürnberg* - Assicurazioni di bagagli per viaggi in tutto il mondo. Gottgetren & Ko. Hannover (Germ.) Herrenstr. 12 - Corrispondenza e pubblicità in Esp...

LETTERKESTETO DE I. E. F.

C. D. en Cagliari - Per le singole quote seroe come riceuta la tessera sociale, che viene mandata a tutti: i nomi degli aderenti saranno pubblicati nel Bollettino trimestrale, di cui il primo numero uscirà in aprile. — Per i versamenti riferentisi al passato esercizio sarà interpellato l'ex-Segretario.

Grupo de Udine - Pri la propagandmaterialo laŭ ni Vi estas tre pravaj. Sed... ja Vi scias la financon kondiĉon! Niajn gratulojn k. dankojn pro Via simpatia kaj inteligenta laborado, en harmonio kuragiga kun niaj klopodoj. Se ĉiuj Vin similus!... Pri gram. Pomaricoj ni anketoj.

Per imparare l'Esperanto non basta aver studiato la grammatica. È necessario l'esercizio e le BUONE LETTURE. Fate la vostra scelta nell'elenco Speciali Combinazioni Pacchi Libri pubblicato in questo numero.

Le migliori pagine

della letteratura Esperanto

si leggono nell'

Esperanta Legolibro

DI B. ED E. MIGLIORINI

Chi ancora non le conosce, acquisti subito il volumetto.

Non costa che L. 4.40 franco di porto.

Agli abbonati dell' I. E. R. - L. 3.50.

Vedere Combinazioni Speciali nella pagina seguente

COMBINAZIONI PACCHI LIBRI AL MASSIMO BUON PREZZO

PACCO N. 1.

1. Rememoroj de Esperantisto, 5
 2. Gvidlibro tra Trentino, 3.50
 3. La Patro, 1
 4. Kantanta Kamparo, 1
- TOTALE L. 10.50 PER L. 7.

PACCO N. 2

1. Kvin noveloj, Tuglas, 20
 2. En la fino de la mondo, 4
 3. Popi kaj Huhuu, 2
- TOTALE L. 26 PER L. 15

PACCO N. 3

1. Morgaŭ matene, dramo, 6
 2. Penseroj, 1.20
 3. Libretto rosso, 1
 4. La Padova Lilio, 5
 5. Epizodo de milito 1
 6. Rimini, 2
- TOTALE L. 16.20 PER L. 10

PACCO N. 4

1. Floretoj de S. Francisko, 6
 2. La Padova Lilio, 5
 3. S. Francisko, 2.50
 4. Assisi, 2
 5. De Apeninoj ĝis Andoj, 2.50
- TOTALE L. 18 PER L. 12

PACCO N. 5

1. Ŝakludado, 3
 2. Dua Eksercaro, 1
 3. Rimini, 2
 4. Vi sola, Esperanto..., 1.50
 5. Parva Grammatica, 1
 6. Statuti e Regolamenti della Cattedra Italiana d'Esperanto, 1.50
- TOTALE L. 10 PER L. 6

PACCO N. 6

1. Elementoj de Geometrio absoluta, I. vol., L. 13.50
 2. Elementoj de Geometrio absoluta, II. vol., 13.50
- TOTALE L. 27 PER L. 16

PACCO N. 7

1. Bildotabuloj por la instruado de Esperanto, L. 15
 2. La pesto en Milano dum 1630, 2
 3. De Alpoj al la Maro, 2 kaieroj, 5
 4. Terni, 1
 5. Parva Grammatica Inter. idiom. E., 1
 6. Vi sola, Esperanto..., 1.50
- TOTALE L. 27.50 PER L. 16.50

PACCO N. 8

1. Vendreda Klubo, 8.50
 2. Tra la Mondo, 6.50
 3. Geografia koncepto « Regiono », 1
 4. Rimini, 2
- TOTALE L. 17 PER L. 12

PACCO N. 9

1. La pesto en Milano, 2
 2. De Alpoj al la Maro, 2 kajeroj, 5
 3. Terni, 1
 4. Esperanto & Interlingua, 1.50
- TOTALE L. 7.50 PER L. 5

PACCO N. 10

1. Venecio, 8
 2. Manuale di Esperanto, 1
 3. Ensorĉo, 1
 4. Gefianĉoj, 5-a ĉap., 1
- TOTALE L. 11 PER L. 7.50

PACCO N. 11

1. Venecio, 8
 2. Trentino, 3.50
 3. Rimini, 2
 4. Italio, 2.50
 5. Mantova, 2.50
 6. Terni, 1 — 7. Assisi, 2
- TOTALE L. 21.50 PER L. 15

PACCO N. 12

1. Lilio, romano, 10
 2. Javaj legendoj, 5
 3. Tatterley, romano, 5
 4. Ok noveloj, 5
- TOTALE L. 25 PER L. 18

APPROFITTAENE!

Inviare commissioni accompagnate dall'importo all'editore A. Paolet in S. Vito al Tagliamento

EDZIGOJ DUM FEBRUARO

La riĉaj kampuloj de Castelrotto (ridanta alpa vilaĝo ĉe alpoj Siusi, 84 kilometrojn malproksime de Trento), festas sian edzigon je la duono de februaro, per riĉega soleno kaj per strangaj kaj gentilaj moroj, tradiciaj en la vilaĝego.

Antaŭ la edziĝoj.

Dum la tri dimanĉoj antaŭ la edziĝo, la gefianĉoj, vestitaj per siaj pentrindaj kostumoj, ĉeestas la kantatan meson; en ĝi la pastro sciigas la edzigo-promeson, kiu en la novaj provincoj (ĝis antaŭ tri jaroj, la religia edzeco, ankaŭ civile) anstataŭis la publikadojn de la urbestro en la kumunuma registro.

La estontaj edzoj eliras lastaj el la preĝejo kaj pasas meze de la scivolemuloj, kiuj atendas ilin ekstere.

La lasta dimanĉo ili tagmanĝas en hotelo sen iu gasto.

Iajn tagojn antaŭ la edziĝoj, ili iras kune por fari la invitojn: oni invitas la gefratojn, la pastron, la baptopatrojn, la baptofilojn kaj fine ĉiujn najbarojn, kies farmoj samlimas kun tiuj de la geedzoj. Sed la genajbaroj devas transporti la doton de la edzino en la domon de la edzo, nokte kaj kaŝe, ĉar kiu renkontus ilin rajtus ŝteli ion, kion poste oni devus reĉeti.

Ili ornamas la ĉambron simple, sed elegante. Kiu vidis la tablon jam preparita, jam plena je floroj kaj kukoj, nepre devas miri. La lertaj kuiristinoj de la « Ŝafido » (nomo de la hotelo) laboras la tutan semajnon por prepari grandegajn tortojn, pudingojn, biskvitojn, gelatenojn kaj aliajn kukajojn.

Kvankam la gastoj preskaŭ ĉiam estas kvindeko, nebie ŝajnas, ke ili povu manĝi ĉion. Sed dekkvar portajoj da vian-

do, kaj aliaj mangajoj antaŭiras la multnombrajn kukajojn.

La muziko sonadas la tutan ferian tagon en la apuda verando. Kiel pago la muzikistoj ricevas iajn mangajojn (faritajn per faruno, lardo, ŝinko, kolbaso, viando, ovoj, k. t. p.), kuiritajn... en la grandega lavkaldrono de la hotelo.

La edziĝa ceremonio.

La matenon, antaŭiritaj de la muzikistoj, je la oka, glitveturilo alvenas la edzoj. Ili vestas la tradician kostumon. Ĝi konsistas el: verda ĉapelo, blanka korsajo kun mallongaj manikoj, funebra robo, kaj belega silka kolorita naztuko, por la edzino; kaj ĉapelo kun plumoj kaj floroj, velura veŝto, artiste plektita zono, mallongaj ledaj pantalonoj, kaj nigraj botoj por la edzo.

Je la oka kaj duono la muzikistoj antaŭeniras la malgrandan popolamason; la bopatro, kiu estas atestanto, kaj la edzo, kun alia atestanto, alkondukas la edzinon, mane. La atestanto devas teni la manon de la edzino, por ke la ĉeestantoj ne povu... ŝin rabi.

En la preĝejo post la edziĝa beno kaj post la kantita meso, al la edzino oni donas duan benon, dume ke la patro prezentas al la geedzoj kaj al la atestantoj, pokalon da vino.

Post la religia funkcio la geedzoj eliras el la preĝejo. La atestantoj, kiuj sekvas ilin, aliras kun ili al la hotelo, por komenci la feston.

Ok horoj da festeno.

Je la dekkvara la placeto antaŭ la hotelo estas personplena. Ĉevaloj riĉe ornamitaj ektrenas la glitveturilojn. En ĉiu glitveturilo estas paro vestiita same kiel la

geedzoj. La popolamaso pro la stranga kostumo estas belega kaj havas ion mezepokan.

En la hotela portiko la edzoj, ricevinte siajn gastojn akompanas ilin en la mangoĉambron, kie tuj komenciĝas la festeno. Ili mangas kaj trinkas sen interrompo ĝis la dudekdua.

Apud la edzoj sidas la atestantoj, kaj poste, la pastro, la baptopatroj, la baptofiloj, la najbaroj, la fratoj kaj la servistoj.

Dum la tuta tempo de la festemo la edzoj ne povas sin movi de sia loko. La gastoj povas prezenti al siaj amikinoj kafon, kiun ili aĉetis en alia hotelo kaj ricevas kontraŭ ĝi tri cigarojn, kiujn ili enmetas en la ĉapelrubando.

La dancoj de la tortoj

Je la dudekdua komenciĝas la « danco de la tortoj ». La atestantoj dancas tenante en la manoj torton en kies centro estas virina figureto; ili pasas daŭre antaŭ la edzinoj, saltetante kaj sin turnante ĝis kiam tiuj ĉi sukcesas forpreni la figureton.

Post ne longe ili elĉerpas la mangojn.

La pasintajn jarojn post la ceremonioj oni faris maskludojn.

Se la geedzoj havas ian mankon, aŭ faris ian friponadon antaŭ ol la edziĝo, la maskoj faras ŝercan kaj satiran reprezentadon pri ĝi.

La timo de similaj reprezentoj, dum la edziĝo devus malhelpi, ke la junuloj faru malbonajn agadojn.

el itala trad. A. Bencivenga Barbaro

LA KALUMNIO

(El la komika verko: « La Barbiro de Seviljo ».)

Kalumni' venteto estas aertremo tre ĝentila: sen impreso, sen alarmo, altirante per la ĉarmo, ekbrueti emas ĝi.

Jen singarde, ne kriante, dolĉe, preskaŭ silabante, ĝi ekiras, ĝi subiras, la orelojn ĝi eniras, kun lertoc' eniĝas ĉien; komenciĝas la kriado, ĉiu cerb' konfuza jen.

Foririnte el la buŝo kreskas ĉiam la bruaro, superflugas la kriaro,

uragano jen, tondrado, kiu en l' arbara brusto per grumblego, per fajfado vin frostigas pro terur'.

Fine krevas kaj elfluas kiel lafo de vulkano: ĝi muĝanta jen tondraro, pafadanta kanonaro, lavangaro glitfalanta, fulmotondro kun tertremo tra bruega la aer'.

Kaj al la viktin' mizera en honteg', en ĉagrenego, de l' popol' sub la kriego, ho ve, krevi restas nur!

trad. A. Mazzolini

È dovere di ogni persona

che vuol essere Esperantista, perfezionarsi nella lingua leggendo buoni libri. — Combinazioni e prezzi speciali per i nostri abbonati si trovano in altra parte della rivista. — **APPROFITATENE SUBITO.**

EN LA "NIGRA ARBARO"

Historia rakonto el Paragvaja milito, verkita de A. A. SANTOS MOREIRA, kaj de li dediĉita al Carlindo Lellis — La tradukintino dediĉas ĝin al la italaj herooj de Alpoj kaj Vittorio Veneto

« Nigra linio » estis brazila tranĉeo en Paragvajlando, kies maldekstra flanko apogas sin al laĝeto Pires, kaj kies dekstra flanko kontraŭ malamikaj situacioj direktas sin al Saŭĉe'o.

Ĝi estas timeginda situacio, kaj ĝiaj muregoj, kiujn niaj bravaj patricioj starigis sub siblado de pafoj kaj sonorado de Lopes'aj bombardiloj, ne posedas elegantan estetikon de arto, sed enhavas mirindan fortekecon.

Ili estas starigitaj en noktaj labirintoj de densa arbetaro, intermetitaj inter dikaj trunkoj de gigantaj kaj folioplennaj arboj, tra kies interplektitaj branĉoj la suno tre malfacile penetras.

Tiuj malhelaj muregoj, sur kiuj mallaŭtsonoraj pafilegoj kvietege kliniĝas, havas aspekton vere funebran kaj minacantan; pro tio la nomigon: « nigra linio ».

En sama kompakta arbetaro, malproksime je duona pistola pafokontraŭe, la malamikoj estas konstruintaj alian ne malpliteruran kaj fortikan armigon.

Ambaŭ estas armitaj per potencaj pafilegoj kaj ŝajnas spioni tage kaj nokte, tra la malhela lumo de l' tago kaj la densa duonombro de l' nokto.

Tranĉeo malamika estas garnita per bronzaĵaj kaj fanatikaj soldatoj de diktatoro Lopez, malmolaj kabokloj, vastkorpaj, fortaj, posteuloj je plimulto el « guarany » kun hispanoj, viroj pro tio potencaj, havantaj la blindan kuragon de la unuaj kaj la subtilan sagacecon de la duaj.

Garnizono de « nigra linio », preskaŭ en sia tuteco konsistas el cearanoj ¹⁾ ĝe-
1) Anoj de norda Brazila ŝtato Ceará [Seará].

nerale malgrasaj, maldikegaj, nigritaj, pro la fortega zenito de l' ekvatoro, sed kun fortika fibro, facilmovaj, inteligentaj, malmegaj, bravaj ĝis la superega heroeo, kiu lasas foriri vivon per knarado de kuglo aŭ terura eksplodo de grenado.

De tie, oni vidas la senfinajn sablejojn de Tufuti'o, kiuj, ĉe unu flanko, malaperiĝas en la malklara kaj malbela akvo de la laĝeto, kaj, ĉe alia, vastiĝas kiel dubeflava kaj vastega tapiŝo, kie, graciaj kaj elegantaj palmarboj — la belegaj kaj flekseblaj « jutahi'oj » — starigas, maldikegaj, malfermante al blankaj nuboj la tremantaj ventumilojn de siaj malklaraj palmoj. Ĉiutage, preskaŭ ĉiuhore, ĉiuminute en unu el la tranĉeoj, krevas fajr-ŝtono... Oni aŭdas kuglan zumadon kaj samtempe, en alia, krevas morta ekgemo!

Kaj en tiu tranĉeo, soldato falas inercie, por ĉiam! Estas necese tie la plej granda singardo pro morto: kapo, kiu elstaras unu palmon el la malluma linio de l'murego, estas kondamnita: ĝi estas tentata celo, kiun malamika celado rapide celas.

Ofte, en unu aŭ en alia ĉirkaŭo, oficiro aŭ soldato supreniras, tiel, kiel rampulo, ĝis la plej altaj tranĉeoj de arbo...

Tie, rifugita malantaŭ densaj branĉaroj, li rigardas per tigre rigardo la internon de l' kontraŭa armigo...

Ĉu oni vidas sur kelka ripozbenketo ian malamikan soldaton trankvile kuŝitan dormante?

El supre sia belvedero la pafanto senmovigas la celadon... Kaj, per trafanta pafado, traboras flegme flankon ĉe flanko la

korpon de l'malfeliĉulo, kiu, eble, en revo, en dolorega korpremeo de aŭdado, korbatis je filino, patrino aŭ edzino karulinegaj, kiuj restis malproksime, en patruja lando! Tio estas abomena!

Ĉe l' nokto, ĉiuj singardoj estas fortigitaj: oni disvastigas gardo-starantojn al ĉiuj direktoj kaj ĝis granda interspaco de l' tranĉeo.

Ne malofte renkontas sin, je mallumaj horoj, du kontraŭaj gardistoj. Tiam, batalado estas korpo kontraŭ korpo, per blankarmilo, per pulso.

Preskaŭ ĉiam, maldika cearano kun pe-reiga lumado de bajoneto, renversas teren, sen vivo, muskolplenan kaj vastkorpan paragvajanon.

Okazas ordinare, post fortega fajra tago de l' niaj, nokta surprizo de l' malamiko. Je tiuj minutoj niaj gardistoj estas perfide oferbuĉitaj!

Kaj, se pro rapideco kaj subtileco de l' atako, ili ne sukcesus krei almenaŭ alarmon, la Lopez'aj soldatoj rapidegas kiel koleregaj fantomoj sur la silentan « nigra linio ».

Je tiuj doloregaj momentoj, lumajetoj de fajroŝtalo, ĉe la ektondro de l' pafoj, iluminas la dormantan arbaron kiel funeburan fulmo.

Komence, nesufiĉaj, eksplodbruoj iom post iom multigas; ili eĉ plifortigas timige, alprenante grandecon de reala batalo.

Ĉe iuj lokoj de l' tranĉeo, sur la randmuroj de l' baterioj, oni bataladas per blankarmiloj.

Oni antaŭsentas la ŝanceliĝan venkon super la batalantoj... Subite, en nigra linio » kriegas unu, du, tri kuglarkanonoj! Ĝi estas solvo: forigitaj, mortigitaj, forlasante en niaj tranĉeoj dekon da kadavroj, ĉiuj ĝiaj atakantoj, malorde forkuras.

Unu post alia silentigas bruoj; sur bran-

ĉoj de l' arboj, kornikkriante kaj pepante revenas sidigi, dormemaj birdoj, kiujn la bruego de l' batalo forflugigis. Tiel, kiel birdoj, kvietigas homoj, kaj la nokto pasas senbrue.

Sekvantan tagon, oni plenigas intermanojn faritajn en la garnizonoj, kaj ĉio daŭrigas kiel antaŭe. Kaj tiamaniere, de la 16^a de Julio 1866 ĝis la 21^a de Marto 1868, subtenis sin kontraŭe, ĉe duona pistolpafu unu de l' alia, tiuj du teruraj baterioj!

Unika ekzemplo en historio de militoj.

Je fino de '67 estas senditaj tridek soldatoj por helpi la bravegajn defendantojn de l' « nigra linio ».

Estas inter ili malfeliĉa leprulo; pro tio liaj kunuloj lin malakceptas abomene. Tiu bedaŭrinda kreitaĵo estas el Bahi'a'o.

Komprenante la malamon kaj antipation, kiujn li elvokas en siaj armkunuloj, li vivas tute forigita de ili kaj preskaŭ ĉiam disigita je sia propra roto, por malproksimaj kaj riskaj fortikturoj.

Palega, skeleta kaj angula, kun granda pusa ulcero konsumanta malrapide la maldokstran vangon, la mizerulo havas aspekton vere naŭzeantan, metita en eluzita uniformo, kiu malbone alivestas la kadavran malgrasecon de liaj ripoj.

Li havas longajn kaj ribeligajn harojn, kiuj foriras kunmiksita kaj nigraj sub la randaĵo de l' kepo, kaj lasas kreski senorde sian barbon, por kaŝi la naŭzigan malbelegecon de sia putraĵo.

Li ŝajnas multe suferi, sed ĉiam rezignacie.

Estas en liaj malgrandaj kaj brunaj okuloj, lokitaj profunde en liaj violetkoloraj okulkavaĵoj inter liaj senokulharaj palpebroj, ia deŝira doloro, kiu ilin igas mortetaj, seriozaj kaj estingitaj.

(daŭrigota)

trad. Braziliano

Lingvaj Rimarkoj

Tono - Tonelo - Tunelo - Tuno - Tino

Kelkfoje, ĉe vortoj eĉ ofte uzataj, regas granda necerteco. Ni havas ekzemple:

- 1) — por A tone F ton G Ton I tono L sonus Gr. tónos: E *tono* (Fund.).
- 2) — por A ton F tonne G Tonne H tonelada I tonnellata R тонна: E *tonelo tuno tono milkilogramo*.
- 3) — por A tunnel F tunnel G Tunnel H túnel I galleria: E *tunelo* (Ofic. Ald.).
- 4) — por A tunny F thon G Thunfisch I tonno L thynnus kaj thunnus Gr thýnnos: E *tuno tino tonfiŝo tunio*.

5) — por A tub F euvier G Tonne I tino: E *tino*. Por definitive forigi ĉiun konfuzon ĉe 2, 4, 5, mi proponas reguligi jene:

Definitivaj Esp.-radikoj

- 1) — *ton-* (Fund.)
- 2) — *tonel-*
- 3) — *tunel-* (Ofic. Ald.)
- 4) — *tun-*
- 5) — *tin-*

Rimarkoj pri 2): *tuno* estas malpli internacia ol *tono* k. *tonelo*: cetere ĝi taŭgas pli bone por 4) laŭ latina, greka, germana, angla — *tono* estas internacia radiko, sed evitebla duoblaĵo — *milkilogramo* estas **praktike neakceptebla**, pezega vorto, ekz. ĉe marista terminaro, fervoja kaj eble aliaj, precipe ĉe devenvortoj. Oni pensu nur: anstataŭ *tonelkilometro*: *milkilogramkilometro*!!

Ton- por 2) estas uzata de Rollet en M. T.: ĝi estas certe pli bona ol *tun-*, sed kial akcepti duoblan signifon 1) k. 2) por la sama radiko *ton-*, kiam oni tiel facile povas ĝin eviti? *Tonel-* tute ne estas malbela aŭ peza radiko. Ankaŭ mi rifuzus la nepravan kaj senkaŭzan solvon de Verax *ton(el)o*.

Rimarkoj pri 4): kial *tino* kiam *tuno* estas almenaŭ egale taŭga kaj estas libera radiko? Por italoj, ekz., estas multe pli agrabla *tun-* ol *tin-*. — *tonfiŝo* maskas la radikon *ton-* kiu estas malplibona ol *tun-* kaj *tin-*, kaj plibone uzenda por 1) kaj 2) — *tunio* estas nekomprenebla Meazzinaĵo. Cetere por *tun-* jam emis Grosjean-Maupin, laŭ Franca Vortaro de la Presa Societo, kaj la malnova Meazzini. Sed la ĉefa afero estas eviti ke pogranda komercisto pri tunfiŝoj mendu al tunejo *tunon da tunaj* aŭ *tunon da tinoj en tino*!

Ŝajnas al mi ke la Akademio povus, mi ne diras ion **trudi**, sed enketi per la gazetaro en ĉiuj landoj, por atingi (post oportuna diskutado) la akordigon inter ĉiuj vortaristoj kaj la oficialigon de la plej bonaj esprimoj rilate al tiuj ĉi 5 ideoj. Mi ekaŭdas jam: « la uzado elektos ». Sed mi opinias ke en ĉi-speciala kazo, kie radikoj duonteknikaj kaj ne ofte uzataj sin miksas al ordinaraĵoj, la uzado eble kreskigos, kaj ne malaperigos la grandan konfuzon.

Kion pensas P-ro Grosjean-Maupin kaj la amiko D-ro Migliorini?

R. Orengo

Folkloraj kaj Etnografaj Grupoj.


La 28-a Universala Kongreso de Esperanto en Edinburgo montris ke Esperanto havigas neordinaran oportunon por komparaj folkloraj studoj. Sekve de tio, okazis fakkunsido de Folkloro kaj Etnografio, en kiu oni decidis starigi internacian Grupon por la kontentigo de tiu intereso. S-roj J. van Heugel kaj D. Witterdijk, el Nederlando, afable konsentis malfermi apartan rubrikon de Folkloro en sia revuo « Kolektanto », kaj s-ro R. Kodera, el Japanujo, akceptis la funkcion de fakredaktanto.

Kiel unua kunlaboraĵo, oni elektis la kompanan studon de la popolaj jaraj festoj en diversaj landoj. Tiu laboro estas presigota serio en « Kolektanto » (La unua artikolo aperis en la januara numero).

Estis ankaŭ proponite, ke la grupo estu uzota kiel helpilo por individuaj studoj de ĝiaj anoj dezirantaj ricevi komparajn informojn de aliaj landoj.

Ĉiu interesato bonvolu interrilatiĝi kun S-ro Kodera, ĉe M.me Gavarry, 187 rue St. Jacques, Paris, 5 (ĝis majo).

Popolajn presajojn en kiu ajn lingvo aŭ dialekto (kanzonojn, humorajojn, religiajn verketojn, preĝojn, almanakojn posajn aŭ murajn ktp.) aĉetas aŭ interŝanĝas per esperantaj malnovaj gazetoj A. TELLINI - BOLOGNA (VI), Via de' Gombruti 5.



Proverbs in Esperanto and English, from ZAMENHOF'S *Proverbaro* translated by M. C. BUTLER, London, ĉe Brita Esp. Asocio, 1926, pp. 160, ŝil. 1.9 afrankite.

Eleganta poŝlibreto en miniaturoformato, kiu enhavas pli ol 500 proverbojn elektitajn el la *Proverbaro Esperanta* de D-ro Zamenhof, aranĝitajn laŭ la Esperanta alfabetordo; sur la kontraŭa pago, oni legas la anglan tradukon.

Havante anglan fianĉinon, studante anglan lingvon, aŭ nur ŝatante belajn libretojn, aĉetu ĝin.

b. m.

A. MAIR, **Kompleta Traktado pri la prepozicioj (veraj kaj ŝajnaj) kaj pri la akuzativo en Esperanto**. Wien, ĉe la aŭtoro (Hasnerstrasse 103), 1926, pp. 70, prezo 1 ŝ. 2.

Post la scienco, iom malfacila verketo de E. Wüster pri la Esp. prepozicioj, aperinta en 1924, jen praktika libreto, kiu donas por ĉiu prepozicio riĉan kolekton da ekzemploj, kaj estos tre utila al perfektigemuloj. Pluajn klasikajn ekzemplojn la aŭtoro estus povinta elĉerpi el la bonega gramatiko de C. Aymonier - E. Grosjean-Maupin, *Cours méthodique d'Esp., Versions*, Parizo, Esp. Centra Libr., pp. 92-125.

b. m.

Common commercial Terms in English & Esperanto, Welwyn Garden City, The Esp. Institute Lim., [1926], pp. 6.

Akurate redaktita komerca terminareto Angla-Esperanto, nepre konsilinda al komercistoj.

JOHN RUSKIN, **La reĝo de la Ora Rivero aŭ la Nigraj Fratoj**. El la Angla tradukis IVY KELLERMANN. Berlin-Dresden, Ellersiek & Borel, 1926, pp. 40. Mk. 0.40 (*Esp. Bibl. Intern.*, N. 18).

Verkita de la konata aŭtoro kaj artkritikisto J. Ruskin (1819-1900) por juna knabino, tiu ĉi rakonto ĉarme brodas sur folkloro temo moralan instruon. La stilo estas tre korekta (p. 33 *dolorigis* anst. *doloris*), la represo tre zorga.

b. m.

A. BELWENDT, **Achtung! Welle Esperanto-Hilfsbuch für den Esperanto. Unterricht**

durch Rundfunk. Berlin-Dresden, Ellersiek u. Borel, 1926. Mk. 0.90.

La multobliĝo de la Esperanto-kursoj per radio jam naskas specialajn lernolibrojn. Tiu de poŝtkonsilanto s-ro Behrendt havas 14 lecionojn, konsistantajn el tekstoj pgrade pli malfacilaj, sekvataj de leksikon-gramatika komentario. Resuma gramatiko — uzebla de la aŭdantoj por igi siajn konojn pli sisteme — kaj konciza vortaro — precipe por retradukoj — troviĝas ĉe la fino.

b. m.

J. GRAU CASAS, **Novaj amaj poemoj**, Barcelona (Clarís 72), 1927, pp. 32, p. 1.

Admiro, espero, ĝojo, doloro: la eterna balanciĝo de sentoj en koro amanta, esprimita per poeta talento.

b. m.

ITALA KRONIKO

Firenze. Sukcesplena parolado de nia eminenta samideano Pastro Caroli, ĉe kulkurasocio « Athenaeum » kaj grava esp. ekspozicio aranĝita de Prof. Corrado Grazzini tre interesigis. Ĉeestis multaj eminentuloj.

Roma. Roma E. Grupo kunvenas ĉe Caffè Greco ĉiujauĉe je h. 21.30.

Udine. La 28-1 nia malnova friula pioniro, Pastro Jakobo Bianchini, L. K., majstre paroladis ĉe Popola Universitato pri: « Utileco kaj neceso de internacia helplingvo » antaŭ multuombra aŭskultintaro.

Post la parolado, en gaja samideana rondo, la udine'a esperantistaro pasigis, kune kun Pastro Bianchini, neforgeseblajn horojn.

NASKIĜOJ

Al geedzoj Francisko kaj Maria Cavallaro el Ottajano (Napoli) naskiĝis fileto, Jozefo.

Al geedzoj Marko kaj Margareto Nob. Casini el Novara, fileto, Johan-Paŭlo.

Tipografia Editrice A. Paolet, S. Vito al Tagliamento
A. Paolet, dir.-resp.

KIE KIEL KIAM?
ĈIE ĈIEL ĈIAM
NI DEVAS UZI ESPERANTON

Renovigu tuj vian abonon al I.E.R

RIBASSI SPECIALI per le seguenti pubblicazioni:

Manuale Stromboli:

Copie	25	50	75	100
Lire	100	190	280	370

Manuale Migliorini:

Copie	25	50	75	100
Lire	50	97	142	185

Esperanta Legolibro di B. ed E. Migliorini L. 4

Per 10 o più copie sconto 20 per cento

Al prezzi soprassegnati va aggiunto il 10 per cento per spese di spedizione ed imballo
PAGAMENTO ANTICIPATO all'editore A. Paolet in S. Vito al Tagliamento

RICORDIAMO che un buon **Manuale di Esperanto** è contenuto nella prima annata de *L'Esperanto* (1913)

Il libro è altamente interessante, non solo per la grammatica della lingua che in esso è svolta ampiamente, in modo facile e con esercizi ben graduati, ma altresì per i numerosi articoli e la varietà delle rubriche, che mettono in chiara evidenza la grande importanza dell'Esperanto in tutte le manifestazioni dell'arte e del pensiero nei rapporti internazionali tra i popoli.

Esso serve mirabilmente tanto a coloro che desiderano apprendere la lingua anche senza maestro, come a coloro che amano farsi un buon corredo di cognizioni per propagarla mediante conferenze e corsi pubblici.

Le 24 dispense dell'annata formano un bel volume, legato in brochure, di pagine 192, del formato 24x15.

Prezzo del volume LIRE 3.50 — Presso la nostra rivista.

10.000

membrojn devas havi

UEA

ALIĜU TUJ!

GENÈVE, 12 B.d du Théâtre

DISTINTIVI

Rammento che sono sempre unico depositario dei distintivi esperantisti di una importante fabbrica. Listino gratis a richiesta.

Accetto richieste abbonamento HEROLDO DE ESPERANTO e VERDA STELO. (Abb. annuo Heroldo Lire 60).

Rag. Amerigo L. Reni
Via Mameli 2 — Verona

UN GIORNALINO PREZIOSO

al quale tutti i padri di famiglia dovrebbero abbonare i loro figlioli è



"LO SCOLARO"

settimanale illustrato in 16 pagine appositamente scritte per i piccoli studenti.

Un'annata de « LO SCOLARO » forma un volume di 700 pagine con più di 1000 illustrazioni.

L'abbonamento annuo costa L. 12.80.

LO SCOLARO si trova in vendita presso le edicole. Se ne può avere una copia gratis rivolgendosi all'Amministrazione del Giornale: S. Matteo, 12 - GENOVA.

Se vi deziras ricevi SENPAGAJN specimenojn de la plej aktuala, ĉiusemajna Esperanto-jurnalo

HEROLDO DE ESPERANTO

aŭ de la plej malkara, monata Esperanto-gazeto

VERDA STELO

kune kun nia plej nova LIBRO-KATALOGO, skribu tuj al la Administracio de

Heroldo de Esperanto, Herrem b. Köln Germanujo.

Bonstila, belilustrita, riĉaspekta kaj diversenhava estas la sola teknika gazeto

Internacia Radio-Revuo

Organo de la Internacia Radio-Asocio.

KONSTANTAJ FAKOJ

Mi konstruas — Paŝo post Paŝo (originale popularigata teorio de Radio) — Radiohumoro — Internacia Radio Vivo — Tra la Radio-Gazetaro — Esperanto por Radio, Radio per Esperanto — Internacia Radio-Asocio k. a...

PREMIO POR ĈIUJ ABONANTOJ:

KOLORTABELO DE 99 SKEMOJ
Konkurso kun multnombraj premioj

(i.e. kompleta radio-riĉevilo, lutilaro kaj multaj radinajoj)

Abonprezo (p. 12 N-oj): **UNU DOLARO** aŭ egalval. en nacia mono

Petu de la eldonejo la tabelon de FAVORAJ PREZOJ,

de naciaj AGENTEJOJ kaj la kondiĉojn de KONKURSO

POR ITALUJO: FAVORPREZO 19 LIROJ

Reprezent.: S-ro G. Saggiori, Corso Vittorio Em. II., 6. Padova.

Cefredaktoro: D-ro Pierre Corret

Redaktoro: Inj. E. Aisberg

ELDONOJO: ETIENNE CHIRON, 40, RUE DE SEINE, PARIS-VI

ESPERANTA KOMERCA VORTARO